

Stanislavo Belov

## *Paradizo ŝtelita: kontraŭdiraj impresoj*

*Paradizo ŝtelita*, de Trevor Steele, eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2012, 333 p., ISBN 9789077066492.



Kiam la redakcio turnis sin al mi kun la peto recenzi ĉi romanon, mi dubis pri la praveco de tiu decido. Mi ja estas nek verkisto<sup>1</sup>, nek kritikisto, nura libroŝatanto kaj legemulo. “Sed ni bezonas vidpunkton ĝuste de ordinara leganto”, respondis Jorge Camacho. Nu, tiukaze la elekto estis sufiĉe trafa.

Aparte plaĉis al mi la nomo de la aŭtoro – Trevor Steele, fama esperanto-verkisto el Aŭstralio, kun kiu mi havis eblon interkonatiĝi kaj almenaŭ mallonge interparoli dum la lasta UK en Hanojo. Mi ankoraŭ ne legis liajn antaŭajn verkojn, sed la Steele-a eseo *Aventuroj de naivulo en la oceano de literatura business*<sup>2</sup> ĉarmis min per sia trafa kaj subtila ironio, kiu ĉiam elmontras saĝan homon. Sed nun antaŭ mi estis romano – verko multe pli ampleksa (333 paĝoj) kaj tute serioza.

### Rakonta teksaĵo

Sen malkaŝi la tutan intrigon, mi rakontu ĝian enhavon tre koncize kaj proksimume. Brita historiisto vojaĝas al Tasmanio por esplori la historion de la formorto de la tieaj aborigenoj. Li scias, ke ĉefa figuro de tiu procezo estas lia samlandano George Augustus Robinson, kies rolon li strebas riveli kaj precizigi. Sekvas vico da renkontiĝoj kun reprezentantoj de la iama kolonia administracio, kun lokuloj kaj kun la lasta vivanta aborigenino, Trukanini. Surbaze de iliaj rakontoj la historiisto iom post iom rekonstruas kronikon de la tragedio. Finfine li renkontas en Anglio Robinsonon mem, kio donas finajn strekojn al ties psikologia portreto. Feliĉe en fora kolonio la esploristo trovas ion pli gravan ol nurajn informojn, kaj tio ŝanĝas lian propran vivon.

1 Fine de 2012 mi venkis en publicista fako de la literatura konkurso Fabel (“Torĉo”), post kio mi estis rekomendita kaj laŭdire jam akceptita kiel ano de la Verkista Asocio de Rusio. Sed mi daŭre ne konsideras min vera verkisto, do kontraŭis tiun akcepton, kaŭzante malkontenton de la asocia estraro.

2 BA3, septembro 2008, p. 52-55.

Eble el mia resumo leganto povus konkludi, ke temas pri senĉesaj intervjuoj kaj sciencaj esploroj, do mi hastas detruiri tiun impreson. La verkisto uzas malsamajn literaturajn rimedojn, kaj inter ili rekta dialogo estas uzata sufiĉe (laŭ mi eĉ tro) malofte. Fakte antaŭ niaj okuloj sekvas kelkaj historifluoj. La unua estas strikte ligita al la menciita esploristo, kies ĉefa rolo estas lanĉi laŭvican etapon de la rakonto kaj poste resumi ĝian enhavon. La dua rakontofluo prezentas vicon da eventoj okazintaj antaŭ multaj jaroj. Ili malmergiĝas el rememoroj de atestantoj, sed disetendiĝas antaŭ ni kvazaŭ rakontataj de iu demiurgo, sen indiki la rolon de la rakontanto kaj lian lokon en tiuj okazaĵoj. Fakte tiel aŭdiĝas la voĉo de la aŭtoro, tre forta kaj laŭ mia gusto eĉ troa.

Cetere miaj impresoj pri la libro estas kontraŭdiraj, do mi preferis dividi ilin je du partoj.

### Plaĉoj

Kio plaĉis al mi en ĉi romano? Plej multe interesis min la historio mem. Mi finis historian fakultaton, 15 jarojn laboris kiel historiisto en muzeo de Tjumenaj provinco (Siberio, Rusio), verkis dekojn da sciencaj artikoloj kaj eldonis libron. Do mia intereso estas tute natura kaj komprenebla. Sed mi opinias, ke la tasmania tragedio alvokos atenton ne nur de fakuloj, ĉar temas pri okazaĵo pli grava ol nura laŭvica malapero de indiĝena etno. Tiu historio starigas antaŭ ni strategian demandon: ĉu entute eblas kunvivado de la du malsamaj mondoj – tiu moderna kaj tiu aborigena, formiĝinta antaŭ jarcentoj aŭ eĉ jarmiloj?

La tutmonda historio donas multajn ekzemplojn de ekstermado de gentoj fare de aliuloj. Krueleco ĉiam sidis en la homa koro, do la reago al rezisto de lokuloj ofte estis tre severa kaj rezultigis plenan neniigon. Foje iuj etnoj malaperis pro neglekto aŭ hazarda amasiĝo de negativaj kondiĉoj – epidemio, malsato ktp.

Sed ĉi kazo tute malsamas. La tasmaniaj aborigenoj estis nek laŭcele ekstermataj, nek ignorataj. La brita administracio simple ne sciis, kion fari pri tiuj homoj, kies teron nun okupas koloniantoj. La aborigenoj ne volis akcepti eŭropajn vivmanieron kaj pensadon, ili nomadis en arbaroj kaj fojfoje atakis britojn, plejparte senkulpajn paŝtistojn kaj terkultivistojn. Kaj jen alvenas ideo de apartigo, kies antaŭenigo kaj realigo iĝis George Augustus Robinson.

Tiun planon oni apenaŭ povus nomi fripona aŭ naiva. Disapartigi la du komunumojn, donante al ĉiu propran terenon kun apartaj rajtoj kaj privilegioj – ĉu malbona ideo? Verŝajne pro tio la sperto de la aŭstralia “protektanto de aborigenoj” iĝis fundamento de postaj agoj pri indiĝenoj de Ameriko.

Tamen rezulte de tio, post multa kaj pena laboro la tasmaniaj aborigenoj fine formortas. Ĉiuj klopodoj montriĝis vanaj. La plano fiaskis. Ĉu neeviteble? Mi dubas.

Mi loĝas en Tjumeno, la unue fondita rusa urbo en Siberio. Kiam en la fino de la 16-a jarcento rusaj pioniroj alvenis tiun regionon, ĝi jam estis loĝata. En la suda parto loĝis siberiaj tataroj<sup>3</sup> kaj buĥaroj<sup>4</sup>, en pli nordaj areoj nomadis la ĥantoj, mansoj, selkupoj kaj nenecoj<sup>5</sup>. La rusoj alvenis kun armiloj enmane, do ilia unua renkontiĝo kun la aborigenoj estis milita kaj sufiĉe sangoversĥa. Sed nun, post pli ol kvar jarcentoj en mia regiono daŭre loĝas ĉiuj supre menciitaj etnoj kaj ilia nombro senĉese kreskas. Ĉu miraklo? Ne, temas pri normala sekvo de la ŝtata politiko.

La Rusia ŝtato ekde sia naskiĝo estis komunumo por pluraj etnoj. Tio eblis danke al la ĉefa principo de la ŝtata etna-religia politiko: reganto interesiĝu pri tributoj kaj impostoj, ne pri religio kaj etno de siaj regatoj. Post kiam establiĝis rusaj urboj kaj fortresoj en Siberio, lokaj indiĝenoj plejparte ĝuis liberan vivon en siaj tradiciaj lokoj kaj nur en difinita tempo pagis imposton al caraj reprezentantoj. Fojfoje ili opiniis sin ĝenataj de la rusoj, ekzemple de rusaj kamparanoj kiuj fondis vilaĝon apud ilia tereno. Tiukaze la siberiaj tataroj sendis al vojevodoj<sup>6</sup> depeŝon kun priskribo de sia malĝojo, kaj preskaŭ ĉiam la rusa administracio subtenis kaj kontentigis indiĝenojn, eĉ se por tio necesis transloki tutajn rusajn vilaĝojn. “Por ne ĝeni indiĝenojn” – mi ofte renkontis tiun formulon en arkivaj dokumentoj.

Rezulte de tio nun niaj aborigenoj suferas pli de troa ŝtata zorgado ol de ties manko. Mia amiko etnografo, antaŭnelonge reveninta el la Jamala tundro, rakontas, ke internulejoj por lokaj nenecoj estas tiom ŝikaj kaj senzorgigaj (ili eĉ ne ordigas siajn ĉambrojn – tion faras specialaj kunlaborantoj), ke fininte lernejon junaj nenecoj ne volas reveni al tradicia vivo en tundro, tro pena kaj malfacila por ili.

3 Etno, kies lingvo kaj eĉ aspekto grave diferencas de tiuj de la volgaj (kazanaj) tataroj kaj de la krimeaĵ tataroj.

4 Posteuloj de elmigrintoj el Buĥaro en Centra Azio – taĝikoj, uzbekoj ka. Ĝis la 1920-aj jaroj la buĥaroj konsideris sin aparta etno, sed nun estas tute asimiliĝintaj al la tataroj.

5 Etnoj apartenantaj al la urala lingvogrupo: la selkupoj estas samojedaj, la aliaj finn-ugraj. Laŭ la *Esperantlingva Etnonoma Glosaro* de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj ([ikel.stel.net/etnoglosaro.html](http://ikel.stel.net/etnoglosaro.html)), nenecoj nomiĝu nencoj – *Red.*

6 *NPIV* restriktas la signifon al “Balkanlandoj k Pollando”, sed ĉi tie: “en Ruslando, regnestro de certa teritorio, kiu ordinare reprezentis la tutan potencon plenuman, ĵuĝan kaj armean”.

Do verŝajne ankaŭ la brita administracio havis elekton aŭ almenaŭ eblon ekhavi ĝin – ĉu izoli aborigenojn aŭ dividi kun ili tiujn insulojn. Laŭ mi temas plejparte pri grava deira eraro: la britoj ne kontentiĝis pri nura kunvivado, ili bezonis “normaligi” lokulojn per trudo de siaj religio, vestoj kaj vivkutimoj tre fremdaj al tasmanianoj. Aktiva enmiksiĝo en la aborigenan vivon sen bezonataj konoj rezultigis tragedion – tiukaze vere neeviteblan.

### Malplaĉoj

Kio malplaĉis al mi en tiu verko? Laŭ mia gusto en la romano estas tro da aŭtora ĉeesto. La aŭtoro ne tiom priskribas al ni okazaĵojn, kiom strikte prenas leganton je la mano kaj kondukas tra la historio de li rakontata. Li kvazaŭ ne tute fidas al siaj roluloj, do post ĉiu pli-malpli grava okazaĵo komentas kaj klarigas al ni, kio kaj kial vere okazis. Laŭ mi la personoj pentritaj de Steele pli gajnus, se li permesus al ili iom pli da libera spirado, donus al ili spacon por manovri, agi memstare kaj riveli siajn trajtojn.

Oni ne povas diri, ke ĉiuj roluloj estas nur unuflankaj, ja Trevor Steele estas tro saĝa kaj sperta verkisto por eviti la kaptilon de nigrablanko. Li montras, ke eĉ la protagonisto George Augustus Robinson iusence amis tiujn aborigenojn kaj ĝuis ilian akompanon. Sed ĝenerale la bildo estas sufiĉe simpla: racia kolonia administracio, tute indeferenta al la sorto de la aborigenoj, bonkoraj tasmanianoj kiuj pereas kiel herberoj plagitaj de neatendita frosto, kaj fripono Robinson kiu trouzas la fidon de ambaŭ flankoj por siaj monavidaj kaj karieraj celoj.

La verkisto entute, laŭ mia gusto, tro detale klarigas al leganto ĉion okazantan – ĉu temas pri agoj, pensoj aŭ travivaĵoj de roluloj. Anstataŭ doni al oni eblon pensi kaj diveni mem, li prezentas unusolan version de ĉio. Eble tion kaŭzas la maniero kiun li elektis por rakonti la historion. Se la aŭtoro cedus pli da loko al dialogoj, permesante al la kreitaj de li figuroj disvolviĝi iom pli libere, tiam ni aŭdus ilian rektan voĉon forme de dialogoj – sen perado de rerakontanto. Ni ja scias, ke foje laŭkure elbuŝigita vorto povas signifi multon kaj tute renversi nian imagon pri iu homo. Sed pupoj plejparte silentas, parolas nur la pupgvidanto.

### Resumo

Nu, iel aŭ tiel, mi finlegis ĉi verkon. Kaj mi devas agnoski, ke, dum la komenco de la romano ŝajnas al mi iom ordinara, ĝian finon mi konsideras vera sukceso. La lasta sceno kaj aparte la lasta vorto,

elparolita de unu el ĉefroluloj, ĝisradike detruas la pli-malpli pacan bildon pri senbrua kaj preskaŭ natura estingiĝo de la tasmania etno. Neniu kvieto, paco kaj graco – nur ŝoko kaj tragedio senespera, en tiu ĉi kaj en la transa mondo. Steele montras tion al ni per unusola vorto kaj tuj mallevas la kurtenon. Majstra gesto, dankon.

P.S. Kelkaj vortoj pri la eldonaĵo mem. Mi legis ciferecan version de la libro en epub-formato. Siatempe mi legis en *Monato*<sup>7</sup> detalan artikolon pri ĉi afero, post kio mi decidis akiri PocketBook, kiel plej konvenan al esperanto-tekstoj. Nun mi abonas epub-version de *Monato*, tra legis tiel multajn esperanto-librojn kaj forte rekomendas tion al ĉiuj.

Ĉi-kaze mi povas diri, ke la eldonaĵo estas zorge kaj profesie preparita. Tajperaroj preskaŭ tute mankas. La cifereca versio funkcias tute glate kaj senprobleme.

<sup>7</sup> Paul Peeraerts, *De Gutenberg al iPad, Monato*, 2010/04, p. 20, esperanto. [be/fel/2010/010009.php](http://be/fel/2010/010009.php)

## Probal Daŝgupto

### *Survoje al serioze universala bildvortaro*

*Bildvortaro, de Petro Desmet' kaj Jozefo Horvath, eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2012, 800 p., ISBN 9789077066485.*



Kvankam la sistemo de fundamenta enskribiĝo kaj Oficialaj Aldonoj kreas specifajn trafikdevigojn en la Esperanta vortaristado, ni tamen konstatas en ekzemple *PIV 2005* malsimetriojn de speco sufiĉe kutima en la etnaj lingvoj. Konsideru la neoficialan sed zamenhofan vorton *daktilografii*, difinitan kiel “maŝinskribi, tajpi”, apud la leksikero *tajpi* apartenanta al la 8a Oficiala Aldono kaj ricevinta la difinon “skribi tekston per maŝino”. La difino de *daktilografi* do uzas la komunlingvan vorton *tajpi*, dum la difinanto de *tajpi* ne trovis uzbezonojn por la specialaĵo *daktilografi*.

Tiajn malsimetriojn motivas simpla fakto pri ni, kiuj konsultas vortarojn. Homo ne scianta la sencon de la vorto *tajpi* malofte turnas

sin al unulingva Esperanta vortaro. Sed multaj uzantoj de tia vortaro povas ne koni la vorton *daktilografi*. Serĉante en *PIV* difinon de la speciala vorto *daktilografi*, mi plej verŝajne ŝtopas breĉon en miaj konuoj. Sed ne tiucele mi serĉus leksikan difinon de la komunuzaj vorto *tajpi*; nepre temus pri celo alia. Ekzemple, mi havus enkape la demandon: Ĉu la labirinto de eventualaj pradifinoj katenis la komprenon de tajpado al la skribado per la preskaŭ forgesitaj tradiciaj skribmaŝinoj? Ĉu do la konvencioj registritaj en la normaj vortaroj de Esperanto devigas nin diri *klavi* lige kun la komputila klavaro karakterizanta nian epokon? Hazarde *PIV 2005* ne helpas min atingi ĝuste tiun celon en gloro; sed mi elektis la ekzemplon por ilustrati la leksikografian traktadon de komunuzaj kaj specialaj vortoj, ne por ĉikani pri detaloj de tiu aŭ alia Pivo.

Resume dirite, mia kono de komunaj vortoj faras el mi kapablan uzanton de tia vortaro, kiel *PIV*, kie estas evidenta la leksikografia malsimetrio ĵus reliefigita: nome, la difino de specialaj vortoj preskaŭ ĉiam uzas similsencan komunlingvan vorton, sed ne inverse. Ĉu havas sencan apliki ĉi tiun principon al bildvortaro, tamen? Kiaj malsimetriroj ŝoforas tiun tipon de leksika verko?

Tiu ĉi eseisto proksimiĝas denove al sia ĉefa risko, tro okupiĝi pri abstraktaj konceptoj. Mi ne volas instigi la ĉi-fojajn recenzatojn diri (kiel foje diris Nikola Raŝić): “La recenzo estas tro plena de viaj ideoj, kaj apenaŭ komentas pri mia verko mem.” Ek al la konkreta prikomentado do. Al ‘miaj ideoj’ mi revenos eseo fine.

Ĉu ni komencu ĉe preseraroj? Tamen en la reta epoko, la atentigado pri tiaj makuletoj (kaj la respondado al foje nevalidaj atentigoj) preferinde okazu rete. La eldonisto tute eksplicite petas, ke la uzantoj de tiu ĉi libro vizitadu [wuala/com/Retbutiko/Bildvortaro](http://wuala.com/Retbutiko/Bildvortaro) por konstati ĝisdatigojn. Evidente klientoj povas tie komuniki erarojn, kiujn ili malkovris. Komposteraroj ja troveblas, ekz sur p[aĝo] 244/ t[abelo] 126, paĝo kaj tabelo dediĉitaj al la rubriko *Kermeso, kermesa amuzejo*, “22 kolizaŭto” devus teksti *koliziaŭto*; en la daŭrigo de tiu rubriko sur p. 245/ b[ildo] 126, la apudbilda indiketo plusendas al kolora bildopaĝo, sed misetikedas ĝin kiel paĝon 797: devus teksti 796. Ne al tio recenzanto dediĉu seriozan spacon.

Tamen verŝajne la publiko bezonas scii, ke sur p 45/ b[ildaro] 14, *Ĝenerala geografio IV*, la aspektigo liveras la indikon ‘kolora bildo p. 786’ tro malreliefe por tiu ĉi leganto. Tio ja ne gravus, se la aliro al la koloraj versioj de la bildoj rilatus nur al luksema gusto. Sed ĉi tie temas pri io vere bezonata: la nigrablanka stilo de p. 45 simple malebligas vidi la ekzemplan *stalaktiton*. Ne nepre oni ŝanĝu la stilon de tiaj plusendo-

indikoj, eble truditan de neceso konformi al la tutmonda dudenario; sed la leganton ege helpus, se inter la librokomencaj uzinstrukcioj troviĝus averto pri tio, ke en iu angulo apud kelkaj bildoj kaŝiĝas vertikale presita plusendo al la librofinaj paĝoj koloraj.

Mi sentas similan bezonon averti la publikon pri p. 311/ t. 162, *Etnografio III*, indeksita sur p. 757 en la formo 'afrika etnio 162': la vorto *etnio* malhavas steleton, kvankam ĝi estas neologismo (cetere laŭ mi nebezonaata apud *etno*, sed tio estas alia demando). Kaj sur p. 462/ t. 247, *Bierfarejo II*, sub ero 21, kial *goslara* kun steleto kaj supreskribita 2? Mi ne sukcesis malkovri, kie troviĝas la pria klarigo<sup>1</sup>.

Post tiaj pripresaj temoj, eble ni transiru al alia amata ĉevaleto de la recenzista raso, la transskribo de propraj nomoj? Sur p. 26/ t. 5, *Astronomio III*, "**31 Sunobservatorio** Kitpiko en Tukson, Arizono (Usono) [sekco] [Kitt Peak ĉe Tucson]": oni kaptas la intencon transskribi la ortografian *Tucson* kiel prononcindikan *Tukson* (la manko de fina o montras, ke Tukson estas intencita kiel parta esperantigo); sed tiu intenco – cetere subfosata de la fakto, ke la anglalingvanoj prononcas tiun urbonomon ne kiel Tukson, sed proksimume kiel Túuson – malkomforte sidas apud la plena esperantecigo ĉe la sampaĝa *Kitpiko* kaj ĉe la alipaĝa *Hablo* (p. 28/ t. 6, *Astronomio IV*, "**1 spacoteleskopo Hablo** [Hubble]"). Mi dubas, ĉu en la baldaŭa estonteco vere atingeblos definitiva solvo de demando konate malsimpla – kaj aktuale okupanta labortempon de la Akademio de Esperanto. La Akademio pli aŭ malpli baldaŭ eksplicite adoptos novan starpunkton pri la demandoj, sed ne atendu miraklojn, mi petas.

Post la transskribo de la propraj nomoj ni venas al la elekto de la kulture ĝusta nomo – alia regiono de sensolveco por la leksikografoj de nia epoko. Sur p. 30/ t. 7, *La Atmosfero*, legante "3 Everesto", ni senerare komprenas, pri kiu monto temas; ankaŭ *PIV2005* liveras por ĝi ĝuste tiun nomon, senalternative. Sed la esperantistoj ĝenerale emas ne plu ame-zorge konservi la memoron de la imperia epoko, ĉu ne? Kiu kuraĝus senhezite deklari, ke ne venis ankoraŭ la tempo por rebapti tiun monton, surbaze de la lokana nomo *Ĉomolungma*, per postkolonia Esperanta nomo *Ĉomolungmo*? Pro miaj konataj starpunktoj pri parencaj temoj eventuale iuj legantoj konkludos, ke mi krie pledas por anstataŭigo de *Everesto* per *Ĉomolungmo*; fakte ne; mi nur flagsignas ĉi tie demandon, kiun levis Jorge Camacho antaŭ deko da jaroj<sup>2</sup>. Mi mem

1 Klarigo povus esti, ke Goslar estas urbo ne tro for de Herzberg, kun propra biero (sed kiu deca germana urbo ne havas bieron propran...), tamen tiu klarigo ne sidas en la vortaro mem – *Red*.

2 En Esperanto la formo *Ĉomolungmo* troveblas jam en 1959 en la verko

devas konfesi, ke ĝis lia atentigo mi eĉ ne sciis, ke *Everesto* ne estas universale akceptata kiel la sola nomo de tiu pinto. Eĉ nun mi persone ja ne havas fortan preferon por unu formo aŭ la alia; estas argumentoj ambaŭflanke, kaj mi volonte partoprenos la debatadon; la komunumo atingu decidon iom post iom, kaj mi fluos kun ĝi.

Sufiĉu pri nomoj do. Kara leganto, ĉu vi amas la temon verba transitiveco? P. 28/ t. 6, *Astronomio IV*, “23 kalibriga plataĵo por sciencaj instrumentoj” (dispresa reliefigo mia) kolizias kun la difinoj en *PIV 2005*: ~[=*kalibr*]i (tr) *Kontroli la ~on de io per ~ilo. ~igi. Fari, ke iu korpo havu ian precizan diametron*. Recenzanto sen forta prefero povas nur atentigi pri manko de kongruo, kaj noti, ke ĉiaj leksikografiaj diskutoj en Esperanto devas referencadi al niaj Pivoj. Ne estis hazarda mia elekto de ekzempla vortaro en la komencaj alineoj. Samteme bonvolu rimarki, ke sur p. 245/ t. 126 la vorto *nacelo* ricevas sencon ne rekte priskribitan en *PIV 2005*, kvankam certe defendeblan kiel figura uzo bazita sur la piva difino.

La priformata konsekvenceco estas grava por leksikografoj, kiuj finfine estas inter la veraj gardantoj kaj reviziantoj de niaj konvencioj. Ĉe p. 76/ t. 30, *Hospitalo I*, “**1 intensflega sekcio** (intensaflegejo)”: ni evidente konsentas, ke la interna *a* estas fakultativa; sed estas iom nekutime, ke la redakcio eĉ ene de unu linio pretas reklami sian nepovon decidi, ĉu finfine preferi havi aŭ ne havi tiun *a*. Mi mem estus por la formo kun *a*: multaj esperantistoj ne sukcesus aŭdi klare, ekzemple sub la aŭskultaj kondiĉoj trudataj de telefono aŭ mikrofono, la konsonantojn en *intensflega*.

Nun mi transiras al la temo neologismoj. P. 32/ t. 8, *Meteorologio I (veterscienco)*, “19 subita, loka nedaŭra pluvo; ŝaŭro\*”: kiel la steleto indikas, *ŝaŭro* estas neologismo – unu el la malmultaj proponataj. Komprenibile neniu neas la ĝeneralan neceson de novaj radikoj, sed tiu ĉi ne aspektas nepra. Eventuale *foj/pluv/o* senĝene plenumus la fakvortan funkcion kaj, se ĝi enradikiĝus, starigus utiletan modelon de plua vortformado.

Komprenibile ne ĉiuj kunmetitaj vortoj povas servi kiel sekvindaj modeloj. Konsideru ekzemplon donitan en la Enkonduko: “En nia familio la vorto ‘lavotaĵujo’ estas memkompreneblaĵo, kaj la frazo ‘ĵetu ĝin en la lavotaĵujon’ neniam kaŭzas miskomprenojn” (p. 7). Tiu vorto ja estas tiusence modela; sed ĝi memorigas min pri io en mia propra

---

*Nepalo malfermas la pordon* de Tibor Sekelj (en la postparolo de Juan Régulo Pérez) kaj, en la nuna tempo, en la poemaro *Saturno*, de Camacho (2004). Ĝin registras almenaŭ la jenaj vortaroj: *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch* (1999) de Erich-Dieter Krause kaj *Etimologia vortaro de la propraj nomoj* (2005) de André Cherpillod – Red.



familio, kio nepre ne povas liveri imitindan ŝablonon. En nia hejmo troviĝas treege eta tirkestetaro. Ĝi alvenis kune kun alia mebleto, mezgranda, kiu konsistis el plastaj korboj tenataj en kadro. Ni tiam – ne nur Esperante, sed en ĉiuj niaj uzlingvoj – baptis ilin *korbetaro* resp *korbaro*. Malgraŭ la evidenta netaŭgeco de la nomo *korbetaro* por io objektive konsistanta el tirkestetoj kaj ne el korbetoj, la historio de niaj aĉetoj diktis tiun misbapton. Ne petu la Daŝguptojn revizii ĝin; tamen ja ne pensu, ke mi ial opinius ĝin modela aŭ imitinda.

Teme de modeloj kaj ŝablonoj, ne nur pri lingvaj modeloj, ne nur pri la lingvo entute, temas en bildvortaro, kiu laŭ sia naturo devas esti enciklopedieca. Ankaŭ pri kulturaj modeloj kaj sekvindecoj temas, kaj la bildoj aparte peze portas tiun respondecon. Nun ni finfine reproximiĝas al la demando (levita frue en tiu ĉi recenzo), kiaj fundamentaj malsimetrioj do ŝoforas specife bildan vortaron.

Ekzemple, sur p. 113/ t. 50, “17 sofotutaĵo” estas utila kaj prudenta vortkunmeto. Sed uzanto de la vortaro, kiu ial emus voĉdoni por la formo *sofokompleto*, heziteme demandus sin unue: Ĉu Esperanto tiel forte ligas la vorton *kompleto* al specifaj okcidentkulturaj vestaĵoj, ke aliaj uzoj de tiu vorto estas malpli tuje komprenataj kaj do evitindaj en la praktika vivo? Tiu sama paĝo donas al la vorto *vivoĉambro* elstarecon – nomante per ĝi la tutan rubrikon – kaj tiel levas eĉ pli draste la demandon de kulturaj profiloj ĉe la leksikografoj. Ĉu la vorto *vivoĉambro* mem, diference de *salono*, estas tiel vaste konata? Kaj ĉu la bildigo aperanta sur p. 113 esprimas ĝeneralan aspirobjekton – celon, kiu nin ĉiujn konsumas, se retoriki aulde – en konsumisma hodiaŭo adoranta la materiajn diojn, ankaŭ en landoj ne sukcesintaj liveri tiaĉambran vivadon al pli ol malmultegaj inter siaj loĝantoj?

Eble vi trovas tion senenhava ĉikano. Bone, jen iom da enhavo: p. 178-9/ t. 91-b 91, rubriko *Bilardo*, montras kelkon da variantoj el Eŭropo kaj Usono, sed tie (kaj aliloke) tute mankas la bilardeca karambolludo, kies ludantoj frapas tien-reen sur tabulo blankajn, nigrajn kaj ruĝajn disketojn. Temas pri ludo sufiĉe ŝatata en Barato – mi ne povas diri, kiom vaste ĝi estas konata aliloke; tamen ja ne ĉio en la vortaro estas karakterizebla kiel tutmonda, ĉu ne? Kian impreson donas al ni la apero de “31-32 kristana tombejo – juda tombejo”, sen alikonfesiaj najbaroj, sur p. 52 / t. 18 komentario al p. 53/ b. 18, la *Urbomapo*? Kio estas prezentata kiel tipa, kaj kial?

Kompreneble respondanto al tiu retorika demando rajtas apelacii al la germana ekirpunkto de la dudena entrepreno. Simile eŭropan ekirpunkton havas la ekzamena kadro KER (Komuna Eŭropa Referenckadro), por kiu oni nun strebas atingi tutmondan uzeblon kaj

agnoskeblon. Mi raportas la unuflankajn specifecojn ĉi tie ne por krei *Bas!*, sed por doni bazon, kiu ebligos pluiron al serioza universaleco. Tio venigas la diskuton al tiuj... miaj ideoj, en kiujn mi ne volis tuj entiri vin, se vi bone memoras.

Esperanto estas idiomo bazita sur fendita universalismo. En ĝia kultura spaco dekomence la poluso Baghy – kiu deziras ĉefe lingvon **por ĉiuj** kaj kies eseista korifeo estis Piron – debatas kun la poluso Kalocsay – kiu volas ĉefe lingvon kapablan labori **pri ĉio** kaj kies kastela konstruisto estis Lapenna, la fasoninto de kastela stilo taŭga al komunikilo nun akiranta ĉies konsenton kaj baldaŭ regonta la mondon pere de la instituciario de UN.<sup>3</sup> Parence al tiuj du inter si debatantaj universalismoj, la Esperanta idiomo mem aperas en ĝemelaj formoj. Mi delonge uzas por la idiomoj de Baghy kaj de Kalocsay la konvenajn nomojn **la tabela** (pense al la tabelvortoj, simbolantaj la simplismon kaj simetriemon) kaj **la babela** (alude al la tasko maksimume proksimiĝi al la internacie konataj terminvizaĝoj en multaj laborfakoj, pere de la dekkvina regulo de la fundamenta gramatiko).

Ĉu konvinkas vin la hodiaŭaj defendantoj de la fosindeco de la tabela sulko? Ili argumentas, ke ilia vizio ne bezonas predikojn pri la neceso superi la eŭropcentrecon de la nuna Esperanto, ĉar ili jam mem sukcese forbatalis de sur sia lango la okcidentan dialekton. Ĉu konvinkas vin la aktualaj daŭrigantoj de la kaloĉaja vojo? Ili rezonas, ke la babela funkcias sur pli larĝa tereno kaj tial povas sen aliigo de sia baza logiko facile plilarĝigi ĝin por inkluzivi esprimzorgojn de la ĝis nun nesufiĉe reprezentataj popoloj aŭ fakoj.

Persone dirite, mi mem ne vidas eblan estontecon por la lingvo, en kiu unu el tiuj partioj malaperus kaj kuntirus la dupolusan diskuteton kun si en pereon. Tiu ĉi debato estas konsistiga areno por Esperanto; ĝuste ĉi-terene nia lingvo esprimas leksike gravan tension alfrontandan de la tuta homaro kiel eble plej konscie rilate al siaj diversaj lingvoj. Miajn pensojn pri la demando mi iom disvolvis en la verko *Loĝi en homaj lingvoj* (Novjorko: Mondial, 2011). Ĉi tie mi volus pluir sur tiu vojo per aldono de la propono, ke la **kristala** esperantistaro, kristalklare komprenante la nepre ne forbataleblan dupolusecon (tabelan kaj babelan) de sia lingvo, uzu la bildvortaron,

3 Tiu debato certe transformiĝus, se tiuj subskribintoj al la Manifesto de Rauma, kiuj deklaris ke venis la tempo por fine – tedite de praelisma fanfaronado pri kapablo paroli pri ĉio – nun do paroli pri **io** signifa, efektive lanĉus propran universalismon. Sed ilia stirema kolegaro ŝajne erarvojis sur la lunon **Io**, kiu orbitas ĉirkaŭ la astronomia Zeŭso, nomata Jupitero ĉe la praelisma plebo. (Mi piednotas ĉar mia ĉi-rilata hipotezo estas sendependa de la enteksta rezonfadeno.)

uzu siajn vortodifinajn Pivojn kaj Revojn, uzu siajn nociodismetajn vikipediojn kaj enciklopedietojn. Tiel nia popolo plikoherigos sian kreskantan klorecon pri la mondo, la monderoj, la mondanoj, kaj sukcesos saĝe stiri la diversajn klarigajn ĉarojn, ekipitajn per bildoj, per vortoj, per faktoj.

Ĉu mi ĉi tiel voĉdonas kontraŭ la tro germana ekirpunkto de nia Dudeno? Tute ne; tia voĉdono estus draste sendanka al la erudiciaj kaj senlacaj laborantoj, kiuj kreis la malnovan kaj la ĵusan versiojn de la Esperanta Dudeno! Mi pledas por senŝancela agnosko pri ĝiaj konkretaj radikoj en la germana humo, kaj por klarvida pluirto al pli inkluzivema kaj diversisma prezentomaniero en estontaj versioj. Kiavoje ni atingu tion? Mi proponus, ke aperu enlibre po unu 'tipa' bildo (ekz de 'vivoĉambro', eventuale laŭ la germana modelo pro la neforgesinda historio de la verkiĝo de niaj Dudenoj) kaj ke la reta versio trovebla en [wuala.com/Retbutiko/Bildvortaro](http://wuala.com/Retbutiko/Bildvortaro) liveru ligojn al diversaj alternativoj.

Por ne perdiĝi en ĝangalo, ni sendube akceptos iom da ordo-krea tipigado kaj ŝablonfarado ankaŭ kiam ni fasonos tiajn alternativajn prezentojn. Kiom da tipigado, kaj kun kiaj bazoj aŭ nulagordoj? Tion decidis la evoluo mem. Estis revolucio de Zamenhof lanĉi prototipon kaj post nur unu jaro lasi ĝian pluiron al la 'evolucia' vojo. Recenzante la ĉi-jaran Dudenon, ni nur revizitas la ĝisnunon de tiu (ankoraŭ nesufiĉe pripensita/ prifestita/ daŭrigata) revolucio kaj refortigas nian emon debati inter ni. Tiu nia emo estas grava faktoro subtenanta la kapablon evoluigadi unike kristalan fenestrolingvon, kies lumo pliheligas ankaŭ nian komprenon de la eroj de niaj etnaj lingvoj.

*Ricardo Felipe Albert Reyna*

## *Amdonaco inter amantoj*

*Dialogo, de Júlia Sigmond, ilustrita de Orsolya Láng, eldonejo Exit, Cluj-Napoca, 2012, 80 p., ISBN 978-606-93230-5-2.*

Júlia Sigmond estas unu el pluraj diverstalentaj reprezentantoj de tio, kion mi nomas "popola literaturo en esperanto", kies precipaj trajtoj ĝis nun estas malelitismo kaj sentimentalismo. Kiel faris siatempe Julio Baghy kaj faras hodiaŭ ŝia edzo Filippo (plumnome: Sen Rodin), ŝi verkas facile legeblajn prozaĵojn kaj versaĵojn kun sincera redono de ĉiutage renkonteblaj homoj kaj ties sentoj en formo de senpretendaj